



## Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, la 7-an de Novembro 2022

**Ĉeestantoj:** Jehoŝua Tilleman, Dror Gaon, Avigail Meŝulam, Inbar Mor, Ŝlomo Ŝaĥar, Amri Wandel;

**zome:** Mikaelo Lineckij, Ŝaj Mor.

*Protokolo de la pasinta kunsido estis sendita al la estraranoj kaj baldaŭ enretigota.*

### **1. Raportoj**

**Dror:** pro invito far Renato Corsetti **Inbar** lastatempe partoprenis impresive komunan zomkunvenon de la Londona kaj la Antwerpena E-Kluboj.

### **2. La Zamenhofa Vespero** (Jehoŝua)

a) **Jehoŝua:** la Zamenhofa Vespero okazos hibride en **Alon-Turo** la 12-an de Decembro (lunde), komenciĝante je la 17h45 per libera babilado kaj personaj kontaktoj. La programo komenciĝos je la 18h00, daŭros ĝis la 19h00 kaj post 15-minuta paŭzo renoviĝos ĝis la 20h15. Ni ekserĉu programerojn por la arta parto, kaj ĉiu kiu deziras liveru al mi punktojn por mia jarraporto. **Ŝlomo** prezentos la financan raporton antaŭ la paŭzo.

### **3. Novaj ĉikanoj de la Registristo pri Societoj** (Ŝlomo)

**Ŝlomo:** laŭ la lasta postulo ni sendis al s.m. instanco protokolon de la Ĝenerala Kunveno de ELI (prezidita far Jael Ŝelah), aprobanta la 2-personan subskribadon de niaj oficialaj paperoj kaj informanta pri la nova konsisto de subskribantoj: Ŝaĥar, Tilleman k Wandel. Cetere, nia banko **Miizraĥi** ne postulas dupersonan subskribon sur ĉekoj.

### **4. Luigo de la oficejo** (Ŝlomo)

**Ŝlomo** demandos ĉe la VAT-oficejo en Ĥadera pri konvena aranĝo por eventualaj luontoj.

### **5. Buĝet-plenumo** (Ŝlomo)

a) **Ŝlomo** prezentas sian kvaronjaran raporton pri plenumo kontraŭ la buĝeto. **Aprobata.**

b) **Inbar** intencas proponi al sia patro (simpatianta E-on) la kontadon.

### **6. La 23-a Israela Kongreso** (Amri)

**Amri** proponas laŭ la ĉiujara kutimo meti okonan reklamon en la proksima **RE – Aprobata.**

### **7. La 3-a Virtuala Kongreso de UEA** (Amri)

**Amri:** post la sukceso de ambaŭ antaŭaj (kiuj fakte anstataŭis la UK-ojn) okazos la Tria inter la 24 k la 27 de Novembro. Senpaga aliĝo eblas por la Individuaj Membroj ĝis la 20/11.

**La venonta kunsido:** lunde, la 5-an de Decembro 2022, je la 20h00 (Alon-Turo-2, hibride).

*Protokolis: Jehoŝua Tilleman*